

TEA-BULTENO

1 1^a JARO

NOVEMBRO - DECEMBRO 2008

NUMEROJ 11-12

Lingvo estas la haŭto de la animo.

Fernando Lázaro Carreter

Al la legantaro

Jam per gigantaj paŝoj alproksimiĝas la jarfino, kaj tio igas min iom pripensi pri faritaĵoj kaj nefaritaĵoj, por meti ilin sur la pesilaj tasoj kaj observi, kiu el la du pli malleviĝas. Sed ja mankas ankoraŭ 2 monatoj antaŭ ol la jaro finiĝu, tial pli bone nun simple listigi la jam okazintajn aranĝojn, por poste tuj rigardi al estonteco, ĉar ankoraŭ multo farendas... sed pri ĉio ĉi, pli poste!

Se dum la tuta jaro, malgraŭ niaj klopodoj, preskaŭ komplete neglektis nian agadon ĵurnalistoj de lokaj gazetoj kaj radio/televidoj, ni tamen aŭdigis nian esperantan voĉon almenaŭ unufoje monate (sed ĝenerale eĉ pli!) pere de (kaj danke al) la alirprogramoj de Radio UNO (itale) kaj TSA (slovene): dum tiuj, ĉiufojaj, dek minutoj oni ra-

kontis pri esperanto-movado kaj -okazaĵoj, intervjuis lokajn kaj mallokalajn esperantistojn, atentigis pri lingvaj problemoj ks.

Komence de la jaro startis la Projekto "Malfermitaj pordoj". Unue estis pritraktita la jena temo: "Spacoj por identeco, elradikigaj tempoj", de ses verkistoj, viraj kaj virinaj, kiuj deklamis siajn versaĵojn, ĉe konataj urbaj kafejoj. Oktobre, en la Supera Lernejo pri modernaj lingvoj, okazis serio de ses prelegoj pri la temo: "Lingvoj sen baroj", fare de eminentaj profesoroj el Triesto kaj de du niaj, same elstaraj, amikoj: Ranieri Clerici kaj Zlatko Tišljar. Ĉeestis ankaŭ la aktuala prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, d-ro Renato Corsetti.

Ĉio ĉi okazinta, sed kio okazonta? En novembro konkretiĝos

tre interesa aranĝo, pri kiu mi konsilas vin legi ĉi sube, kaj precipe partopreni en ĝi. Estas invititaj ankaŭ du esperantistoj, tre bone konataj.

Dua evento okazos en decembro: ekspozicio pri desegnaĵoj de la geknaboj partoprenintaj en la jam 3^a Internacia Konkurso pri Kristnasko, organizita de nia asocio, ĉe TEA-sidejo. Inaŭguro okazos vendredon la 5^{an} je la 18^a horo: bonvolu veni kaj ankaŭ inviti viajn konatulojn, ĉar bela surprizo atendos vin! Se vi deziras helpi la kunmetadon kaj muntadon, vi ja scias kie ni estas!

Trie, ne forgesu pri la kutimaj festenoj antaŭkristnaska kaj antaŭjarfina - jen bela momento por kunestadi kaj pasigi gaje kaj bonhumore kelkajn horojn kune. Ni atendas vin!

Via Elda

@sa della letteratura

La Literatura Hejmo, konsistanta el 13 asocioj, inter kiuj ankaŭ la nia, celas antaŭenigi kaj disvastigi literaturon, prezentante ties aspektojn kaj facetojn, plivalorigante samtempe la literaturan kulturon de niaj

provinco kaj regiono en rilato kun tiu nacia kaj internacia.

Fondita antaŭ unu jaro, nun ĝi sin prezentas al publiko per aparta projekto, kiu disvolviĝos en Triesto de la 19^a ĝis la 22^a de novembro 2008.

Kiu ties titolo? HIPERHAVENOJ – LITERATUROJ TRAVOJAĜAS – evento kreita por ke arto kaj literaturo brile aperu en sia plena vivanteco, oportune kreante etoson favorantan la disdonadon kaj disvastigadon de la nuntempa kulturo, interplektante profundajn ligojn kun la urbo Trieste, ties ĉefaj produktaj aktivaĵoj, ties emo al interkoniĝado kaj malfermemo al la cetera mondo. Ĝi enkadriĝas kiel festo de la literaturo, kun realigado de libra foiro, publikaj renkontiĝoj kaj debatoj, lernejoj laboratorioj ktp.

Hiperhavenoj – kiam oni pensas pri Triesto, la unua bildo aperanta antaŭ ĉies okuloj estas la haveno, renkontiĝejo kaj kunveno de ĉiu ajn kulturo, en etoso malferma kaj ema al plua esplorado de l' nekonnato. La haveno de kie startigi vojaĝon, realan aŭ fikcian, kiu povas konduki la menson ĝis la senfino, kaj, je la alveno, prezenti la konkludojn, la rezultojn de propra imaga aŭ konkreta migrado, por starigi novajn demandojn, por krei novajn perspektivojn, por formi kulturon.

El tiu ĉi rezonado eliĝis la ideo pri ĉi evento, kiun aktive ĉeestos tre konataj kaj elstaraj verkistoj kaj intelektuloj, ne nur lokaj. Ankaŭ TEA kontribuas al la riĉa programo: ĵaŭdon la 20^{an} je la 17^a h. en *Galleria Tergesteo*, estos debato pri "Hipernavigadi. Traduk-havenoj": ĉeestos Istvan Ertl. Marino Curnis prezentos, sabaton la 22^{an} je la 18^a horo ĉe Teatro *Miela*, la dokumentan filmon "La piedpremita revo", kiu temas pri piedvojaĝo de Bergamo al Irano. Ĝi daŭros 1 horon kaj duonon: sekvos publika debato.

Sed ne nur niaj amikoj estas aŭskultindaj: kiel jam anoncote, kontribuos al la kvartaga programo pluraj eminentaj verkistoj, kiuj vere meritas vian ĉeeston.

Interesitoj petu pliajn detalojn al TEA-sekretario aŭ -prezidanto, telefone: 040 350093 – 398562; 331 4805706 aŭ 339 2226936; rete: nored@tiscalinet.it aŭ testudo.ts@gmail.com.

(Bonvolu atenti ke ne plu funkcias la malnova telefonnumero de TEA-sidejo! La aktuala estas la jena: 3661720440)



Triesto kaŝita

La Kazino de l' Nobeloj

Iam en Triesto, en *via dei Capitelli*, ĉe la kruciĝo kun *via Trauner*, estis iu fama kunvenejo, nomita "Antikva Kazino de l' Nobeloj". Ĝi estis ejo kie renkontiĝadis amikoj, ŝatantaj kartludi, kuntrinki kafon kaj paroli pri siaj aferoj. Sed la ĉefa aktivaĵo estis hazardludado. La tuta domo apartenis al la nobelo Jakobo *de Gabbiati* kiu, ĉirkaŭ en la jaro 1750^a, ĝin transformis al hazardludejo. Ĝin citis eĉ *Giacomo Casanova* en sia fama memorlibro: tiu loko estas "bela kaj luksa kiom neniu alia!" Estas iom malfacile hodiaŭ imagi, se oni rigardas tiun laste renovigitan konstruaĵon, ke antaŭ pli ol 250 jaroj, en ĝiaj ejoj, ĉarmaj damoj rigardadis la pudritajn kavalirojn riskantajn siajn monhavaĵojn ĉe la ludotablo.

La Madono de Floroj aŭ de Borela

Sub la arkadaro de Palaco *INAIL*, en *via del Teatro Romano* (Romia Teatro), duonkaŝita kaj preskaŭ forgesita, staras eta kapelo. En ĝi troviĝas alabastra busto, datiĝinta de la 16^a jc kaj prezentanta Madonon kun Infano en brakoj, nomita "Madono de Floroj", ĉar iama propraĵo de trinkejestro, kies familia nomo estis *Fior* (Flor). Tiu ĉi statueto estis de li trovita dum fosado en la doma

ĝardeneto. Post zorga purigado, li ĝin elmetis en videbla loko en la trinkejo, kiu tute apudis rulgloban kampon. Oni rakontas, ke iam - tio estis komence de la 19^a jc - dum ludado iu, kolera pro mistrafo de la celglobeto, ĵetis la sian kontraŭ la sanktan bildon, ĝin frapante ĉe la frunto. El tiu "vundo" elgutetis sango, kies spuroj ankoraŭ nun videblas. Ĉia strebo forviŝi tiun damaĝon restis senrezulta. Ekde tiam la statueto ricevis kroman nomon: Madono de *Borela*, ĉar *borela*, en la triesta dialekto, signifas rulglobon. En 1849, kiam ĥolero epidemie kontaĝis grandan parton de triestanaro, la Madono estis procesie portata tra la urbo de la Kunfrataro de Flagelantoj. Iom poste, entute ĉesis tiu terura malsano kaj oni tuj atribuis al la statueto miraklajn povojn.

Dum iu periodo ĝi estis metita en la kapelo de Sankta Johano, ene de la katedralo de Sankta Justo. En septembro 1957, ĝi ricevis sian nunan definitivan lokiĝon, pro volo de la triesta ĉefepiskopo *Antonio Santin*, deziranta ke ĝi situu kiel eble plej proksima al la kapelo de la nobela familio *Conti*, en la Preĝejo *Santa Maria Maggiore* (Sankta Maria Plejgranda).

En la kapeleto estas ankaŭ du pentraĵoj (1951) de *Dino Predonzani*, tre eklektika triesta artisto, kiu aktivadis, dum la pasinta jarcento, en plej diversaj kampoj: pentra, skulpta, ŝip-dekoracia, gravura k.a.



Dediĉita al frandemuloj!

En Kolonjo, Germanio, eblas gustumi specialajn kuketojn, specialajn ne nur pro ties bona gusto! Ili estas specialaj precipe por esperantistoj, kiuj ekde nun povas surprizi siajn gastojn, prezentante sur arĝenta plado la "Ludovikuketojn"! La dolĉaĵbakisto Hermann Kroppenberg ekhavis la ideon produkti tre plaĉajn kaj frandindajn dolĉ-aĵojn el unuaklasa marcipano kaj altkvalita ĉokolado. Ĉiu kuketo pezas ekde 25 ĝis 35 gramoj kaj restas freŝa dum ĉ. du monatoj.

Sed kial la nomo "Ludovikuketoj"? Ĉar bildo de nia Majstro aperas sur ili!

Kioma la kosto? Kiamaniere ili haveblas?

Prezo de unu dolĉaĵeto estas 1,50 eŭroj, minimuma mendokvanto 50 pecoj. Sed konsilindas tuj kontakti la produktanton, por ricevi pluajn pli precizajn informojn kaj ankaŭ por esti certaj surtabligi ilin, okaze de la proksimiĝantaj Kristnaskaj kaj Jarfinaj Festotagoj.

Jen la retadreso de la produktisto s-ro Hermann Kroppenberg: ck@cafe-kroppenberg.de



Jubileo en Germanio!

25^a Internacia Festivalo en Düsseldorf 27 dec 2008 - 3 jan 2009

•IF - Internacia Festivalo ofertas al vi specifan programon por la meza generacio kaj familioj (kun aŭ sen infanoj).

•IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj, kono de Esperanto kaj ĝia uzo estas gravaj, sed laŭdeziro oni ofertas porkomencantajn kaj/aŭ paroligajn kursojn, ekzemple por via partnero.

•varias programo, matena kaj posttagmeza: altnivelaj prelegoj diverstemaj, kursoj, promenoj kaj tuttaga ekskurso. Vespere koncerto, magio kaj danco, silvestraj balo/bufedo kaj internacia vespe-

ro. Zorgos pri viaj amuziĝo kaj gaja kunestado:

•**Mikaelo Bronŝtejn**, aŭtoro kaj bardo el Rusio: Interkona vespero;

•**Jak Le Pull**, kanzonisto el Francio: Koncerto kun kantoj el 30-jara repertuaro;

•**Alejandro Cossavella**, multfaceta artisto el suda Argentino;

•**Triksini**, magiisto el Germanio.

•La programo komenciĝas la 27^{an} de decembro per la interkona vespermanĝo, programfino la 3^{an} de januaro post matenmanĝo.

Pliaj detalaj informoj troveblas ĉe:

HDP@internacia-festivalo.de



Rakontu al mi fabelon...

Ĉevalo kaj rivero - ĉina fabelo

Ĉevalido vivis en stalo kune kun sia patrino kaj, el tiu sekura loko, neniam li estis elirinta, sen akompano de sia panjo. Iun tagon la ĉevalino diris al li: "Ja tempo estas, ke vi eliru kaj komencu plenumi kelkajn komisiojn por mi. Vi hodiaŭ bonvolu porti tiun ĉi saketon da greno al muelejo!" Feliĉa esti tiom utila al sia patrino, la ido ekgalopis al muelejo, dorse portante la sakon.

Iom poste, laŭlonge la vojon, aperis rivero plene akva, kiu fluadis impete. "Kion mi faru? Ĉu mi kapablos ĝin transiri?" Dubema, li haltis ĉe la bordo. Li ne sciis, al kiu peti konsilon. Li ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis maljunan bovon tie paŝtintan.

La ĉevalido alproksimiĝis kaj lin demandis: "Oĉjo, ĉu estas danĝere por mi transiri la riveron?"

"Tutcerte ke ne, la akvo ne estas profunda, ĝi atingas apenaŭ apenaŭ mian genuon, transiru trankvile".

Li startis galope al la rivero, sed kiam li estis atinginta la bordon, sciuro aliris lin saltetante kaj ekscitoplena aldiris: "Ne eniĝu en la riveron, ne, ne! Estas danĝere, vi riskas droni!"

"Ĉu la rivero estas tiom profunda?" demandis, konfuzite, la ĉevalido.

"Certe, iu mia amikio, ĝuste hieraŭ, ĉi tie dronis", rakontis plorvoĉe la sciuro.

La kompatindulo ne plu sciis, al kiu kredi kaj decidis reiri hejmen por konsiliĝi kun la patrino.

Iom embarasita: "Panjo, mi revenis ĉar la akvo estas tre profunda, tial mi ne kuraĝas transiri la riveron."

"Ĉu vi certas? Mi male kredas, ke tie la akvo estas maltre profunda" objetis la ĉevalino.

"Ĝuste tion ĉi diras la maljuna bovo, sed la sciuro insisteme atentigas min, ke la rivero estas tre danĝera kaj ke hieraŭ tie dronis iu lia amiko".

"Provu mem iomete pripensi: nu, ĉu la akvo estas profunda aŭ ne?"

"Verdire mi ne saĝe pritaksis tion".

"Filo mia, vi ne devas aŭskulti la konsilojn, sen pripensi per via propra kapo. Nun, mem rezonadu! La bovo estas alta kaj granda kaj estas normale, ke li juĝu malprofunda la riveron, dum la sciuro estas tiom malgranda, ke eĉ en flako li povus droni: tial li pensas, ke ĝi estas tre profunda".

Aŭskultinte la panjajn vortojn, la ĉevalido, haste kaj memfide, galopis al la rivero. Kiam la sciuro ekvidis lin, jam enirintan en la riveron, li ekkriis: "Ĉu vi decidis drone mortigi vin?"

"Mi deziras provi transiri la riveron!"

Fine la ĉevalido malkovris, ke la rivero akvo estas nek tiom malprofunda, kiel estis dirinta la bovo, nek tiom profunda, kiel estis asertinta la sciuro.



Estas ankoraŭ tempo por partopreni
en la 3^a Internacia Konkurso

KRISTNASKO, BILDE KAJ POEZIE

Ni atendas la verkojn ĝis la 20^a de novembro 2008!
Do, rapidu, ĉar vi riskas perdi interesan okazon!
Petu detalojn, regularon kaj aliĝilojn, poŝte aŭ rete, al

ESPERANTO TRIESTE

CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste
aŭ **nored@tiscalinet.it; testudo.ts@gmail.com**



Ĉiuj ellaboraĵoj estos ekspoziciitaj ĉe la sidejo de Triesta Esperanto-Asocio, Via Coroneo 15 - 3^a etaĝo. La inaŭguro de la ekspozicio okazos vendredon la 5^{an} de decembro, je la 18^a horo. Ĝi estos vizitebla ĉiutage, de la 17^a ĝis la 19^a horoj, escepte de dimanĉo kaj festotagoj, ĝis la 19^a de decembro.

La vizitontoj kaj elektota ĵurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj. Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Triesto, en januaro 2009.

(La dekstra afiŝo, per kiu en Brazilo oni diskonigas la Konkurson, estis farita de Joseo Tenorjo, redaktanto kaj grafikaranĝanto de BRAZILEI, LA LAMPIRO, BRAZILA ESPERANTISTO kaj BEL-INFORMILO, kiu rajtigis ties publikigon.)

Zorgantoj pri la Esperanta Vikipedio alvokas kunlaborantojn!

Okaze de la mejloŝtona artikolo 100mila aperinta meze de junio ĉijara, oni alvokis helpantojn, ne nur por enmeti pluajn artikolojn, sed ankaŭ por plikvalitigi la enhavon de la Esperanto-Vikipedio. Ne nur bonaj artikoloj tamen estas bezonataj: oni bezonas ankaŭ legantojn. Laŭ statistiko de Vikipedio, la esperanta versio troviĝas en bona loko rilate al nombro de artikoloj, sed iom pli malalte rilate ties enhavon, kaj eĉ multe pli malalte se oni prikonsideras la frekvencon de legado kaj konsultado de la tekstoj.

Do, bonvolu ankaŭ vi viziti tiun retan enciklopedion, ĉefe la liston de tre bonaj artikoloj, ĉe:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Elstaraj_artikoloj
http://eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:Elstaraj_artikoloj

kaj ankaŭ: http://eo.wikipedia.org/wiki/Historio_de_UEA; http://eo.wikipedia.org/wiki/Landa_Ascio

KLIMATA VARMIĜO KAJ NEKONSCIO

La ĉi sekvanta artikolo aperis dum la somero 2008 en la franca revuo Silence (Silenton). Ĝia temo, la klimata varmiĝo estas ofte pritraktata en la amaskomunikiloj, sed, en la plej bonaj kazoj, estas proponitaj ridindaj rimedoj, kaj, en la malplej bonaj kazoj, oni eĉ petas, ke ni elektu inter ekonomia bonfarto kaj medioprotektado... La aŭtoro de tiu artikolo, Dro Jacques Janssens, belga psikanalisto, proponas alian elirvojon el la krizo, asertante ke la solvo ja troviĝas en niaj sintenoj.

"La planeda varmiĝo estas, laŭ la vortoj mem, tutmonda problemo; por solvi ĝin, ŝanĝo, kvankam malfacila, de pensmanieroj nepriĝas, sed kontraŭ tio staras gravaj obstakloj. Inter tiuj obstakloj troviĝas tiuj, kiuj lokiĝas en la nekonscia nivelo, kaj tiujn la psikanalizo ebligas klarigi.

Temas, laŭ mi, pri ĝeneraliga persistado de restoj de la "kapta stadio". Laŭ tiu stadio, unuopulo, kvankam ne perceptante sin "centro de la mondo" kiel faras bebo, tamen direktas ĉion al si, al siaj tujaj bezonoj, sen zorgi pri la komunaj intereso, al ĉi lastaj li cedas nur post luktado; kaj temas ankaŭ pri malakcepto de frustrigo, deveno de ĉio ĉi. Ni provu vidi, kiel tio prezentiĝas.

Zorgi pri la aliuloj

Dum sia afekcia evoluo, la homido ja estas unue la centro de la mondo, de mondo, kiu tute servas lin, de mondo kiun li akaparos, posedas, ĉefe pere de sia patrino, kiu, post esti portanta lin, donas al li ĉion, kion li bezonas. Dediĉita al lia protektado, ŝi klopodas eviti al li ĉian suferon, ĉian malfacilaĵon, kaj estas bone tiel.

Tamen, la infano devos forlasi iom post iom tiun pozicion centran, ĉar fariĝi plenkreskulo, trovi sian lokon en la socio (tio povas signifi por kelkaj trovi tiun socion neeltenebla), doni direkton al sia vivo, signifas zorgi pri la aliuloj, rezigni esti centro de la mondo, rezigni proprigi tiun mondon sole al si, signifas akcepti iun frustrigon.

La akceptado de tiuj frustrigoj ne nur ebligas kolektivon vivon, sed ja estas ties fundamento. La fama Edipa komplekso, kiu estis tiom pritraktita, ja estas tio: rezigni esti la sola, submetiĝi al la ekzisto de la aliulo, konkurenci kun li, akcepti lin. Tiu akceptado glatigas la vojon ĝis ama sento al la aliuloj, ĝis persona fordonado kiel idealo; tio ebligas ankaŭ trovi propran

feliĉon en la feliĉo de la aliulo, eĉ se tiu feliĉo implicas personan frustrigon.

Rifuzo de frustrigo

Sed individua proprigado kaj rifuzo de ĉia frustrigo fariĝis, ĝuste kaj paradokse, la idealo proponata al la hodiaŭa homo en la realeco de lia socia vivo, ĝis tia grado, ke sukceso de homo, vira aŭ virina, estas mezurita laŭ posedaĵoj, bankokonto, domo, aŭto, naĝejo, boato; eĉ lia afekcia kaj seksa vivo estas ofte mezurata laŭ la nombro de amkonkeritoj, laŭ liaj sukcesoj aŭ prodaĵoj seksaj.

Tiu bezono posedi kaj profiti de la vivo sen limoj estas lernita tre junaĝe. La infano, ekde sia naskiĝo, estas pli kaj pli saturita per ludiloj, kaj tre frue li havas siajn unuajn postetelefonojn, Playstation-on, komputilon, televidon, sen paroli pri konkurado rilate markajn vestaĵojn. La infanoj estas edukitaj laŭ la ideo de posedo, kaj ili mem ofte estas konsiderataj posedaĵo: elmontritaj fare de gepatroj pro siaj beleco, inteligenteco, en tia grado, ke en kelkaj landoj oni organizas konkursojn de knabinoj maskovestitaj kiel stelulinoj.

Tiuj troe ricevataj ludiloj ofte ne estas amosignoj, sed signoj de aĵoposedo flanke de la gepatroj, oni montras ke la filo estas "eldorlotata", sed fakte tio respegulas senkapablecon ami. Ĉar, krom la fiereco elmontri la ludilojn de iliaj filoj, tio kion volas la gepatroj estas ricevi amopruvojn de la filoj, kaj ili tion ne ricevas - almenaŭ ne tuj - limigante la dezirojn de siaj filoj.

Tiam la situacio estas inversigita: la gepatroj agas timante malplaĉi al la filoj, sed male, la filoj devus agi por kontentigi la gepatrojn.

Eĉ la ŝtato havas nutrantan sintenon. La ŝtata rolo fariĝas, iom post iom, kontentigo de konsumaj bezonoj de la voĉdintoj, ĉar la politikuloj estas

elektitaj inter tiuj kiuj plej bone flatas konsumajn esperojn.

Planedo-patrino foruzinda sen modereco

Kiam la homo malakceptas ĉiajn limojn al sia konsumemo, li daŭre restas infanca kaj ne povas vidi, eĉ ne povas imagi, ke ekzistas limo al lia ekspluatado de la mondo. Tiun mondon li perceptas kiel patrino kiu ĉirkaŭas lin kaj de kiu li nutras sin. Rifuzante ĉian frustrigon, li povas nek akcepti la ideon rezigni pri io ajn, nek akcepti la ideon prirespondi ion ajn, eĉ ne siajn rubaĵojn, kiujn "iu prizorgos", samkiel antaŭe, kiam liaj gepatroj prizorgis liajn vindaĵojn aŭ lavis liajn vestaĵojn.

La planedo ne estas persono

Respekti la planedon, ne signifas reveni al iu animalista koncepto de la mondo, kiu asignas "animon" al la naturo, tio estas nur respegulo de la homa senpovo fronte tion, kion li ne povas superregi. Li tiam asignas volon al la fortoj kaj objektoj, kiujn li timas. Tiu magia koncepto de la mondo, kvankam ĝi estas kortuŝa kaj poezia en sia dialogo fantazia kun la naturo, tamen havigas nur iluzion akordon kun ĝi, eĉ se fakte tiu koncepto instigas respektadon de naturo, almenaŭ kadre de civilizacio ne industria.

Scienco ne estas ĉiopova

Ankaŭ ne indas anstataŭigi tiun magian ideon de dialogo kun naturo, per tiu de sciencista iluzio: iu ĉiopova scienco kiu povus perfekte "superregi" la naturon, kiu povus "eltrovi" kiel eviti la forcejan efikon, kiel nuligi la rubaĵojn, aŭ kiu povus "produkti" puran energion superabunde kaj tiel evitigus al ni ĉian frustrigon sed, male, ebligus nin konsumi eĉ pli.

Scienco en la servo de aliuloj

Scienco povas fari multege, sed bona uzado de ĝi dependas de la homa kapablo ami kaj konsideri la aliulojn. Por solvi la problemon de la klimata varmiĝo,

Mallonge pri ... Italio!

Stud-tago en Florenco

Enkadre de "2008 - Internacia Jaro de Lingvoj", proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, Itala Esperanto-Federacio, kun patroneco de Itala Komisiono por UNESKO kaj kunlabore kun Florenca Komunumo, organizas prestiĝan kunvenon pri la temo HOMAJ KAJ LINGVAJ RAJTOJ, en *Palazzo Vecchio* (Malnova Palaco), la 25^a de novembro ekde la 9^a ĝis la 14^a horo. Partoprenos famaj elstaruloj el la lingva kaj universitata mondo, esperantistaj kaj ne, inter kiuj prof-ro Francesco Sabatini (Itala Lingva Akademio): *Florenco, la placo de eŭropaj lingvoj*; prof-ro Gabriele Iannàccaro (Universitato de Milano): *Lingva ekologio*; prof-ro Davide Astori (Universitato de Parma): *Plurlingvismo kaj tradukaĵoj en la antikva Mediteraneo*; d-ro Michele Gazzola (Universitato de Ĝenevo): *La angla lingvo en universitatoj*; ka.

Se oni deziras tranokti en Florenco, bv. kontakti Enrico Brustolin, ebrusto@tin.it, tel. 3333064384.

Jam sepafoje:

PREMIO ZAMENHOF

PREMIO UMBERTO STOPPOLONI

Kiam: 28 novembro 2008, je la 21^a horo

Kie: *Teatro Sperimentale en Ancona*

Ĉijare Premio **Zamenhof** estos transdonita al:


Lella Costa: pro ties engaĝiĝo por liberigi la suferantajn homojn de maljustaĵoj, diskriminacioj, aroganteco de l' potenculoj;

Ernesto Olivero: pro lia sindediĉa helpemo al flankenpuŝitoj, plenaŝpekto de iliaj kulturoj kaj religioj;

Volontula Centro en la itala regiono Marche: asocio kapabla kunigi idealojn kaj realaĵojn por lukti kontraŭ mizero kaj malriĉeco, per sociaj kaj substrukturaj intervenoj en la tiel dirita "Tria Mondo", subtenante interkulturecon.

Premio **Stoppoloni** estos asignita al asocio "LIBERA - Asocioj, nomoj kaj numeroj kontraŭ ĉiuj mafioj", kuniĝo de asocioj batalantaj por laŭleĝeco kaj defende de malfortuloj.

Por pliaj detaloj, telefonu al 071 36663 aŭ retmesaĝu al grassale@alice.it



MUSTARDO

Ĝi estas spicaĵo el fruktoj kanditaj (per sukero-siropo) kaj spicitaj (per

sinapfaruno).

La nomo devenas de la latina termino *mustum ardens* [=arda mosto], kiu difinis nutran preparadon nepre akragustan. La mustardo estas tipa lombarda produktaĵo kaj aparte de la Mantua kuirarto.

Eĉ se la unuajn sciigojn pri ĝi entenas dokumentoj el la epoko de la *Gonzaga*-kortego, miaopinie la nuna produkto - preparita per pomoj, nematuraj piroj kaj alispecaj fruktoj, sukero kaj likva sinapo - venis al Italio pere de Longobardoj, anstataŭante la praran romian saŭcon, kies nomon ĝi plutenis.

Ĉi tie vi trovas tute specialan recepton el Friula regiono (Karnjo), kiu malhavas fruktopecojn sed estas tre tre bongusta, delikate parfumita, ideala garno por boligitaj viandaĵoj.

INGREDIENCJOJ

500 g	da beroj de Hunda Rozo
2 dl	da seka, blanka vino
2 dl	da vinagro el blanka vino
120 g	da sukero
iomete	da cinamo
5	kariofiloj
1	citrono (nur ŝelo)
1	oranĝo (nur ŝelo)
2	askalonoj (duonigitaj)
2	cidoniaj pomoj
2	(distranĉitaj) laŭro-folioj
	pirogramoj
	salu, laŭbezono



PREPARADO

1 - Purigu zorgeme la berojn: ilin duonigu kaj elprenu la semetojn.

2 - En kaserolo boligu vinon kaj vinagron kune kun citron- kaj oranĝ-ŝeloj, cinamo kaj kariofiloj. Solvu sukeron, salu kaj pipru, miksu plurfoje kaj elvaporigu parton de la likvaĵo.

3 - Filtru la tuton per dens-trua kribrileto.

4 - Aldonu la berojn kaj ilin boligu dum preskaŭ 30 minutoj.

5 - Kribru la tuton kaj la rezultantan kremon konservu en vitraj vazetoj, firme ŝtopitaj.

indas konsideri ne sole individuon ene de familio, klano, tribo, etno, kulturo, aŭ eĉ lando, sed ĝenerale la tutan homaron.

Respekti la planedon implicas kapablon akcepti la frustriĝon, ke ekzistas limo al tio kion eblas fari, al tio kion scienco povas fari, ke la homo estas nek ĉiopova nek senrespondeca.

Akcepti minimumon da frustriĝoj

Endas ŝanĝi la kondiĉitan sintenon afekcian: transpasi de infaneca pensmaniero - troe direktata al akaparado, al egoista konsumado - al pensmaniero kiu relokigas nin en ekstercentran lokon, kiel simplaj anoj de unu sola homaro, por kiu ni pretas akcepti kelkajn frustriĝojn aŭ kelkajn strebojn.

La damaĝoj faritaj al la planedo pro senbrida konsumado estas okazo por ekkonscii pri nia infaneca malakcepto de frustriĝo, pri la neceso kreski.

Fariĝi plenkreskuloj, iusence

Kaj, kiel plenkreskuloj, transdoni al niaj infanoj tiun homaran spiriton, respektoplenan rilate la aliulojn, rilate planedon kiu estas ankaŭ mia; transdoni tiun aŭdacan spiriton, optimismen pri la homa kapablo disvolvi moralon altruisman."

El la franca, tradukis François Stride

Novembra Programo	
4 mardo	20h00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
7 vendredo	20h00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
11 mardo	12h40 - Esperanto en alirprogramoj de RADIO TSA (slovenlingve) 20h00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
14 vendredo	20h00 - Memoroj pri Aldo Viotto
18 mardo	20h00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
20 ĵaŭdo	17h00 - Ĉe Galerio <i>Tergesteo</i> , Istvan Ertl: "Traduk-havenoj"
21 vendredo	14h40 - Alirprogramoj de RADIOUNO 20h00 - Enigmoj en Esperanto
25 mardo	20h00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
28 vendredo	20h00 - Antaŭ 100 jaroj, dum la kongreso en <i>Boulogne-sur-mer</i> - Prelego de Claude Piron (en 2005)

Decembra Programo	
2 mardo	12h40 - Esperanto en la alirprogramoj de RADIO TSA (slovenlingve) 20h00 - Preparlaboroj por la ekspozicio
5 vendredo	18h00 - Inaŭguro de la ekspozicio Kristnasko, bilde kaj poezie
9 mardo	17h30 - Poeziaĵoj pri Kristnasko, itale kaj esperante
12 vendredo	17h30 - Mi rakontas al vi fabelon! 20h00 - Zamenhofa Festo: Enigmoj pri la Majstro
16 mardo	17h30 - Kristnasko harmonie, kun la gitaristo François Stride
19 vendredo	19h00 - Fermo de la ekspozicio: interŝanĝo de Kristnaskaj receptoj
23 mardo	20h00 - Kristnaska Festo!
30 mardo	20h00 - Adiaŭ, 2008^a jaro!
31 merkredo	14h40 - Alirprogramoj de RADIOUNO



**Ekde la 19^a ĝis la 22^a de novembro
HIPERHAVENOJ - Literaturoj travojaĝas!**
Ĵaŭdon la 20^{an}, je la 17^a horo - en Galerio *Tergesteo*, prelego de Istvan Ertl, pri Hipernavigadi. Traduk-havenoj, dum **sabaton la 22^{an}, je la 18^a horo**, Marino Curnis prezentos dokumentan filmon "La piedpremita revo" ĉe Teatro Miela.

Espereble pluraj eroj de la programo novembra kaj decembra interesos vin: ni varme invitas vin partopreni en ili, sed nepre ne forgesu ĉeesti la inaŭguron de la Kristnaska ekspozicio, **vendredon la 5^{an} de decembro, je la 18^a horo**, ĉe TEA-sidejo.

MALFERMA TAGO en Roterdamo

Andy Künzli el Svislando kaj Alejandro Cossavella el Argentino estos la ĉefaj gastoj en la 29^a Malferma Tago de la CO de UEA, kiu okazos sabaton, la 29^{an} de novembro. Tiu ĉi Malferma Tago estos la unua post la fino de la renovigo de la UEA-domo, kie nun okazas la lasta fazo de tiu plurjara projekto.

Andy Künzli ricevis en la ĉi-jara UK la Premion Grabowski pro sia impona enciklopedia verko *Universaj lingvoj en Svislando*. En la novembra programo estos ankaŭ prezento de tiu verko, sed lia ĉefa kontribuo konsistos el du prelegoj pri temoj ligitaj al la jubilea jaro de UEA. Unu temos pri la fondinto de la Asocio, Hector Hodler, kaj la alia estos kvazaŭ ekskurso por konatiĝi kun la diversaj lokoj, en kiuj troviĝis la Centra Oficejo dum ties Ĝeneva periodo.

La kantisto-gitaristo Alejandro Cossavella kontribuis al la Malferma Tago unuafoje en aprilo 1998, ankaŭ tiam en jubilea etoso, ĉar la programo estis dediĉita al la 90-jariĝo de UEA. En la sama jaro li ekfamiliĝis en Esperantujo ankaŭ kiel gajninto de la ĉefpremio de la Belartaj Konkursoj pro kanto dediĉita al la Montpeliera UK.

En la programo de la Tago estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj, minimume 10-procentaj, en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La Malferma Tago daŭros de la 10^a ĝis la 17^a horo.

DOLĈAKRA DE PIER ALDO VIGNAZIA

- Kiel oni nomas, itallingve, tiujn laborojn kiujn la italoj ne ŝatas fari, ĉar tro danĝeraj kaj laciĝaj, kaj tial komisiis al ni, ne-eŭropanoj, ties plenumadon?

FREMDA LINGVO

Kelkaj anoncoj/informoj fontas el NOVA SENTO kaj RET-INFO EVENTOJ

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via Coroneo 15 - Trieste - marde-vendrede 19-21 horoj
tel/fakso: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa ttt-ejo: it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste - Italio
Poŝtekkonto N° 10834349